

Raporto pri libromanuskripto kun la titolo *Ekoturisma vortareto*

1. Enkonduko

La Akademio de Esperanto ricevis la dek trian de Decembro de la jaro du mil deka peton de Petr Chrdle kontroli la lingvaĵon en libromanuskripto kun la titolo *Ekoturisma vortareto: Esperanta – ĉeĥa – germana – angla – franca* verkita de Zdeněk Pluhař, Manfred Westermayer, Christopher Fettes kaj Raymond Skilling. Ĝi enhavas 592 terminojn en Esperanto kun tradukoj en la kvar aliajn lingvojn.

La Akademio de Esperanto akceptis tiun taskon kaj sendis ĝin al sia Sekcio pri faka lingvo. La Sekcio pri faka lingvo studis la tekston kaj nun sendas sian raporton. Ni faras kelkloke komentojn ankaŭ pri la tradukoj – tamen ni ne studis la tradukojn sisteme.

2. Kombineblo de vortelementoj

2.1. La vortelementoj en la Fundamento de Esperanto

Mi aranĝis plenan *dismembriĝon* de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el *senŝanĝaj* vortoj. (Zamenhof 1939:248)

Tiajn elementojn de la lingvo en la Fundamento Kaloscay & Waringhien (PAG, 1985, § 276) nomas *vortelementoj*, *lingvoelementoj* kaj *neŝanĝeblaj lingvoelementoj*. En du lokoj en la citaĵo oni do, laŭ ilia terminelekto, havus *memstarajn vortelementojn* kaj *neŝanĝeblaj vortelementoj*, aŭ, egalnivele kaj samsignife, *memstarajn lingvoelementojn* kaj *neŝanĝeblaj lingvoelementoj*. En la *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (PMEG) de Bertilo Wennergren la sekcio 37.1, kiu pritraktas ĝuste tiujn ĉi konstruelementojn de la lingvo, havas la rubrikon “Vortelementoj kaj signifoj”. En la nuna raporto ni sekvos tiun ĉi terminelekton.

La kombineblo de la vortelementoj en la Fundamento ja ne estas sen limigo, sed ĝi estas karakteriza trajto de Esperanto. Ekzistas jam la vorto *vaporŝipo*, kaj neniu

regulo en la lingvo malhelpas la kreadon de *ŝipovaporo*, *biciklovaporo* aŭ *vaporbiciklo*; nur ĉar neniu ĝis nun konstruis vaporbiciklon la lasta vorto ne estas uzata.

2.2. Vortelementoj en scienco kaj tekniko

Oni povas observi kombineblon de vortelementoj en la teknikaj kaj sciencaj kampoj. Ekzemple NPIV listigas la jenajn afiksojn.

bio/ [sciencoj] Pref.

eko/ [ekologio kaj ekologiismo] Pref.

ekto/ [sciencoj] Pref.

(2) **-gen/ 1** [sciencoj] Suf. [...] **2** [biologio kaj fiziologio (inkl. genetikon, ĉelbiologion, embriologion)] [kemio kaj biokemio] Suf.

homo/ [kemio kaj biokemio] Pref.

infra/ [sciencoj] Pref.

(2) **-it/** [medicino kaj kirurgio] Suf.

(3) **-it/** [kemio kaj biokemio] Suf.

-iz/ [teknikoj] Suf.

mikro/ [sciencoj] Pref.

(2) **-oz/** [kemio kaj biokemio] Suf.

-skop/ [sciencoj] Suf.

tele/ [teknikoj] Pref.

ultra/ [sciencoj] Pref.

Ĉiuj tiuj afiksoj kaj multaj aliaj estas markitaj per vinjetoj, kiuj estas grafikaj simboloj, ĉi tie redonitaj per la klarigoj listigitaj en NPIV (2002:36–37). Ni komparu ilin kun kelkaj afiksoj listigitaj sen vinjeto:

★ **-ej/ 1** - Suf.

★ **ek/ 1** - Pref.

★ **-id/ 1** - Suf.

★ **-ig/** Suf.

(1) ★ **-it/ 1** Suf.

(1) **-oz/** Suf.

(3) **-oz/** Suf.

Evidente vinjeto indikas apartenon al speciala lingvaĵo. Sed ne nur. Ĝi ankaŭ signalas, laŭ la opinio de la Sekcio pri faka lingvo (kvankam NPIV mem ne skribas pri tio) limigon en la kombineblo de la elementoj.

Grava principo estas, laŭ la opinio de la Sekcio pri faka lingvo, ke oni ne kunmetu sciencajn vortelementojn (*tele*, *mikro* k.t.p.) kun elementoj el la ĉiutaga lingvaĵo.

Ekzemploj kia *filologi*¹o substrekas la gravon de tiu principo; ĉi tie ja ne temas pri iu scienco pri filoj.

La libromanuskripto elvokas tiujn problemojn en pluraj kapvortoj. Temas ĉefe pri la vortelementoj *bio* kaj *eko*; la dua eĉ aperas en la titolo de la libro.

2.3. La prefikso *bio*/

La vortoj 65 *biologio*, 72 *biosfero*, 74 *biotopo* estas bone formitaj per sciencaj vort-elementoj grekdevenaj: *bio* ‘rilata al vivo’, *logio* ‘sciokampo, scienco’, *sfero* ‘surfaco de globo’, *topo* ‘loko’. Sed, male, 61 *biogaso*, 64 *bioindikantoj*, 66 *biomalkombinado*, 67, 68 *biomaso*, 70 *bionafto* kaj 71 *bioritmo* miksas scienca vortelementon kun ordinarlingva, tial kontraŭas al la menciita principo, kaj ofte kreas problemojn. La Sekcio pri faka lingvo ne volas ilin ĉiome kondamni, sed kiam facile eblas, oni evitu ilin. Ĉiuokaze necesas zorgaj difinoj.

Vidu plie niajn komentojn pri la terminoj 59–74 en sekcio 9.

2.4. La prefikso *eko*/

Kelkaj sekcianoj esprimis dubojn pri la neoficiala prefikso *eko*/, kiu aperas en la titolo kaj en multaj terminoj. Ĝi laŭ NPIV esprimas “la ideon «konforma al ekologio aŭ ekologiismo»”. Kaj verdire ĝi povas konduki al misanalizo de la pli malnovaj vortoj *ekonom/o*^Z, *ekonomi*^{1o} kaj *ekonomiko*. La Sekcio pri faka lingvo rimarkigas ke en almenaŭ iu lingvo prefikso *eko*/ estas uzata en la signifo ‘ekonomi’, kio estas kroma kaŭzo esti tre prudenta pri la uzo de ĝi.

En la vortoj komenciĝantaj per *eko* fakte temas ne tiom pri ekologio, kiom pri mediprotekto, medizorga konduto aŭ mediprizorga konduto.

Kiam eblas, tiam oni prefere uzu la adjektivojn *ekologia*, *mediprotekta*, *medizorga* aŭ *mediprizorga* kaj en kunmetaĵoj *ekologi-*. La Sekcio pri faka lingvo proponas ke la vortaro enhavu tian rekomendon. Vidu plie niajn komentojn pri la terminoj 122–132 en sekcio 9.

3. Fakvortaro aŭ ordinarlingva vortaro?

Kiam oni verkas terminaron laŭ terminosciencaj principoj, oni unue fiksas la aron de pritraktindaj nocioj kaj poste serĉas taŭgajn terminojn por ili. En vortarscienca aliro, male, oni komencas ĉe la ekzistantaj vortoj kaj esploras iliajn signifojn. Ne estas klare por la Sekcio pri faka lingvo kiun aliron alprenis la verkantoj de la nuna manuskripto; verŝajne temas pri miksaĵo de la du.

Kiam temas pri fakvortaroj ni menci la postulon de Eugen Wüster (1898–1977):

Von der bleibenden sprachlichen Zuordnung ist in der Terminologie zu verlangen, daß sie, um einen Ausdruck aus der Mathematik zu gebrauchen, *eineindeutig* ist. D. h., daß grundsätzlich jedem Begriff nur eine einzige Benennung zugeordnet ist, und umgekehrt. Das ist für einen bestimmten Zeitpunkt, meist für die Gegenwart (“synchronische Sprachbetrachtung”), gemeint. Es sollte also weder mehrdeutige Benennungen (Homonyme und Polyseme), noch Mehrfachbenennungen für einen Begriff (Synonyme) geben. (Wüster 1991:87)

Traduko (la du piednotoj ne estas en la originalo; ili estas aldonitaj kiel klarigoj):

En la terminologio necesas postuli de la konstanta lingva interligo¹ ke ĝi, por uzi esprimon el la matematiko, estu *bijekcia*.² Tio signifas ke principe al ĉiu nocio rilatu nur unu sola nomo, kaj inverse. Tio koncernas difinitan tempopunkton, plej ofte la nuntempon (“sinkronan rigardon al lingvo”). Do ekzistu nek plursignifaj nomoj (homonimoj kaj polisemoj), nek pluraj nomoj (sinonimoj) por unu nocio.

Tamen Wüster tuj koncedas ke tiu ĉi postulo ne validas por la ordinara lingvaĵo, nek por la beletra lingvo.

Ŝajnas ke la nuna manuskripto estas io inter ordinarlingva vortaro kaj fakvortaro; pro tio la aplikeblo de la rekomendo de Wüster ne estas eksterduba. La Sekcio pri faka lingvo opinias ke la aŭtoroj devus pripensi la karakteron de sia manuskripto rilate al la karaktero de ordinarlingva vortaro kontraste al fakvortaro.

4. Precizigo en la antaŭparolo

En la antaŭparolo oni atentigas pri speciala skribmaniero: “Pri la malakordo kun la kutima Esperanta sintakso oni atentigas per komo post la substantivo, ekz.: „ekskurso, enmonta“, „folio, denta“ ks.” Eble estus pli klare se oni aldonus ke la proponataj terminoj estas *enmonta ekskurso*, *denta folio*, *satana boleto* k.t.p. kaj ke oni metis la substantivon unue nur pro la enalfabetigo.

5. Literaturo

Kvin verkoj en la listo de literaturo (paĝo 9) estas verkitaj de “KOLEKTIVO”, kiu ne estas nomo de iu aŭtoro. La Sekcio pri faka lingvo rekomendas ke la referencoj al la kvin verkoj estu verkitaj laŭ kutimaj bibliografiaj konvencioj.

6. Mallongigoj

La ISO-mallongigo *eo* ‘esperanto’ ne aperas en la listo de mallongigoj (paĝo 10). Eble ĝi devus esti tie.

La mallongigo *lat.* signifas ‘latina termino’. Tamen ĝi estas uzata nur por la sciencaj nomoj de vivuloj. La ĝusta esprimo por tia nomo estas *sciencia nomo*, ne “latina nomo”, nek “latina termino”.³

La Sekcio pri faka lingvo rekomendas ke oni anstataŭe uzu iun mallongigon por la klarigo ‘sciencia nomo’, ekzemple *sci*.

7. Sinonimoj kaj difinoj

La vortareto enhavas ĉe kelkaj kapvortoj sinonimon; ĉe kelkaj difinon. Ĝenerale (sed ne ĉie, ekzemple ne en artikolo 109) ili estas enkondukitaj per egalaĵsigno: la

¹Tio estas: ligo inter nocio kaj nomo.

²Tio estas: unusignifa en ambaŭ direktoj.

³Tiuj sciencaj nomoj ofte originas el la latina lingvo, sed ne ĉiam. Ekzemple, *Drosophila* estas grekdevena (kun la signifo ‘rosamanto’), same kiel *melanogaster* (kun la signifo ‘nigra ventra’).

sinonimoj estas presitaj per duongrasaj literoj, la difinoj per kursivaj literoj (sed ekzemple ne en 93). La Sekcio pri faka lingvo deziras ke la distingo estu pli klare markita.

Kiam ekzistas du terminoj kun la sama signifo oni laŭ rekomendoj por fakvortaroj elektu unu el ili kiel la ĉefan aŭ preferatan terminon. Vidu ekzemple Suonuuti (1998:27, sekcion 3.3).

La manuskripto enhavas la paron **51 aŭtobuso (= buso)** kaj **94 buso (= aŭtobuso)**; same **90 bronzepoko (= bronza epoko)** kaj **145 epoko, bronza (= bronzepoko)**, en ambaŭ okazoj tute simetrie, do sen indiko pri la preferata termino aŭ ĉeftermino. La Sekcio pri faka lingvo rekomendas ke oni elektu unu kiel ĉefterminon kaj la alian kiel duan elekton en tiaj okazoj, kaj ke tio estu klara en la prezento.

Sume, la kvar malsamaj uzoj de la egalaĵsigno, do

- (1) por preferata sinonimo,
- (2) por samranga sinonimo (se tiaj ekzistas),
- (3) por nepreferata sinonimo kaj
- (4) por difino

estu anstataŭigitaj per kvar pli klaraj markiloj.

8. Sciencaj nomoj

Kiam temas pri vivuloj kelkfoje la scienca nomo estas indikita (kvankam sub la misgvida nomo “latina termino”; vidu sekcion 6). Ekzemple **119 drozofilo, nigra-ventra (= bananmuŝo)** havas la sciencon nomon *Drosophila melanogaster*; en tiu ĉi okazo temas pri specinomo.

Sed ofte mankas la scienca nomo, ekzemple ĉe **3 abio, 5 acero, 17 aglo, 22 akcipitro, 26 alaŭdo, 31 amanito, 35 angviso, 42 apuso, 56 betulo, penda, 57 betulo, nana, 77 boleto, 78 boleto, flava, 79 boleto, nobla, 80 boleto, satana, 92 burdo, 96 buteo**, por menciigi nur kelkajn komenciĝantajn per la literoj *a* aŭ *b*. La Sekcio pri faka lingvo ne plu notos tiujn mankojn.

La Sekcio pri faka lingvo rekomendas ke ĉiu nomo de vivaĵo estu sekvata de ties scienca nomo kaj indiko ĉu temas pri specio, genro, familio, k.t.p.

Atentu ke la esperanta vorto povas respondi al specio, genro, familio aŭ eĉ ordo; tio estu indikita. Tiam la nomoj de specioj kaj genroj estu skribataj per kursivaj literoj, la nomoj de familioj, ordoj kaj aliaj superaj grupoj per rektaj literoj. Tio estas vere internacia konvencio, kiu validas en ĉiuj lingvoj skribataj per latinaj literoj.⁴

⁴NPIV skribas ankaŭ nomojn de familioj kaj ordoj kursive, laŭ iu regulo ke neesperantaj nomoj estu skribataj kursive. Sed tio estas interdevena regulo, kiun NPIV uzas por klarigi la staton de vorto ene de la lingvo Esperanto. En la elekto inter vere internacia konvencio kaj interdevena regulo de Esperanto la unue menciita konvencio devas havi prioritaton. Se oni ne sekvos ĝin, la teksto aspektos diletantece al ĉiu persono kiu iom konas biologian nomenklaturon aŭ sciencon kompostadon. Estus bone ne krei ĉe ili malestimon.

9. Rimarkigoj pri unuopaj terminoj

2 abelsvarmo (= esameno). La sinonimo ne estas multe konata. Ĝi devus esti markita kiel duaranga sinonimo.

12 aerobia (= aerbezona). Ĉi tie la dua vorto aperas kiel duaranga sinonimo, pro tio ke *aerbezona* ne estas kapvorto. Sed verŝajne estus pli bone inversigi la ordon.⁵

animalo. Tiu termino mankas. Ĝi estas oficiala vorto, enkondukita en la jaro 1974 per la Oka oficiala aldono al la Universala Vortaro: “Komuna vorto por bestoj kaj homoj, opone al vegetalaj kaj mineraloj”. Komparu kun *besto* ĉi-malsupre.

40 anuro. La scienca nomo, Anuro, referencas al ordo kaj tial devas esti skribata per rektaj literoj; vidu sekcion 8.

arbo. Tiu termino mankas.

besto. Tiu termino mankas. Ĝi estas vorto en la Fundamento kun la nuna signifo laŭ NPIV ‘ĉiu animalo escepte de homo’. Antaŭ la oficialigo de *animalo* en 1974 ĝia signifo inkluzivis la homojn, sed post la oficialigo de *animalo* oni rajtas supoziti ke ĝi ricevis la pli malvastan signifon jam menciitan. Komparu kun *animalo* ĉi-supre. La Sekcio pri faka lingvo atentigas pri ĝi pro ĝia iom problema historio.

betulo. Tiu termino mankas.

59–74 bio. Multaj terminoj komenciĝas per *bio*. En pluraj okazoj oni prefere anstataŭigu tiun ĉi prefikson per la adjektivo *biologia* aŭ per alia solvo, ekzemple *vivaĵdiverseco*, *biologiaj indikantoj*, *vegetala nafto*, *vivsistema ritmo*. Aparte menciindas la sekvantaj 60, 61, 62, 67, 68, 71. Vidu la prezenton de la problemo en subsekcio 2.3.

60 biodiverseco, prefere *vivaĵdiverseco*, kaj kun alia difino, ekzemple *diverseco de vivoformoj en ekologia sistemo aŭ sur la tuta planedo*.

61 biogaso. Ĉar temas pri gaso kiu estiĝas el malkombiniĝantaj organikaj substancoj, iu proponas *organika gaso*. Problemo tamen estas ke petrolo kaj ĉiuj oleoj estas organikaj substancoj, eĉ vegetaldevenaj substancoj. La diferenco estas en la temposkalo de la estiĝo. Pro tio la Sekcio pri faka lingvo atentigas pri ĝi. Eble tamen *biogaso* taŭgas, se akompanata de zorga difino.

62 biogena (= por la vivo necesa). Tiu vorto estas aparte problema, ĉar laŭ NPIV la sufikso *-gen/* signifas «generanta, kreanta, estiganta»: *epilepsigena*, *kancero-gena*. Laŭ tiu analizo *biogena* do signifus ‘vivgeneranta, vivkreanta, vivestiganta’. Tamen tio ne estas la tuta vero, ĉar *ekzogena* laŭ NPIV signifas ‘eksterdevena’; *endogena* ‘interndevana’. Laŭ PV la signifoj estas ‘ekstere ekestanta’ respektive ‘kreiĝanta interne’. Oni notu ankaŭ ke la angla termino *biogenic* laŭ Webster (1994) havas la signifojn ‘produced by, or essential to, living cells’, do kun du malsamaj signifoj el kiuj unu estas ‘vivkreita’, la alia ‘vivnecesa’. Sed ‘vivkreanta’ ne aperas tie. Ŝajnas ke oni hezitas inter tri ebloj: *-kreanta* kaj *-kreita* kaj *-necesa*. Pro tio la tuta artikolo 62 kune kun la tradukoj en la kvar

⁵NPIV havas cetera strangan difinon de *neerobia* (ĉe la kapvorto *aerobi/a*).

lingvojn devas esti rekonsiderata kaj reverkita de specialisto pri biologio.

- 67, 68 biomaso.** Estas malbone havi du tiajn homonimojn. La unua prefere estu *vivaĵmaso*, la dua *organikaĵo*.
- 70 bionafto** (= *gasojlo fabrikita el vegetalaj oleoj*). La problemo ĉi tie estas la sama kiel ĉe 61 *biogaso*, nome ke nafto kaj ĉiuj oleoj estas vegetaldevenaj substancoj. La diferenco estas en la temposkalo de la estiĝo. Eble tamen *vegetala nafto* taŭgas, opone al *minerala nafto*, kvazaŭ la pli fora vegetala origino de la minerala nafto estus nun forgesita.
- 71 bioritmo.** Prefere *vivoritmo* aŭ *vivsistema ritmo*.
- 80 boleto, satana.** La scienca nomo de la specio, *Boletus satanas*, mankas. La angla termino devas esti *Satan's mushroom* aŭ *Devil's bolete* aŭ *Satan's bolete* kun majuskla *S* kaj apostrofo (do ne "satan's bolete" kun minuskla *s* kaj ia akcentosigno).
- 83 botaniko (= plantologio).** La Sekcio pri faka lingvo rekomendas ke la sinonimo *plantologio* estu forstrekita, ĉar ĝi estas kunmetaĵo de ordinara vorto (*planto*, kiu cetere laŭ la Fundamento signifas la agon planti) kaj scienca elemento (*logio*). Prefere oni ne kunmetu elementojn tiom malsamajn; vidu subsekcion 2.2. La termino *vegetalscienco*, kiu estas ordinara kunmetaĵo, bone taŭgas kiel sinonimo de *botaniko*.
- 93 burgo (= mezepoka fortigita kastelo), 199 fortikaĵeto (= fuorto), 200 fortikaĵo, 201 fortreso, 216 fuorto (= fortikaĵeto), 286 kastelo.** Tiu sesopo ŝajnas esti en la centro de intereso de la biciklanta turisto, sed ĝi konsistigas familion probleman. La difinoj eble ne kongruas kun nacilingvaj difinoj. La Sekcio pri faka lingvo ne volas eniri detalojn, sed petas pri repensado kaj reverkado de la ses artikoloj inkluzive de la tradukoj.
- 101 cikloturismo.** Laŭ kutima analizo tiu termino signifus 'turismo en cikloj' kaj la termino 98 *ciklo* ja aperas. Tiu analizo do estas misgvida. Prefere *bicikloturismo*, facile senerare analizebla.
- 107 ĉirkaŭbarilo, elektra.** Ĉu ne sufiĉas *barilo*, *elektra*?
- 109 detergento, deterganto.** Ĉi tie oni indikas sinonimojn alimaniere, t.e. sen egalaĵsigno. Oni unuformigu la prezenton. Krome eble unu el la vortoj sufiĉas.
- 113 disvojmontrilo.** La pli simpla *vojmontrilo* sufiĉas.
- 114 diverseco (= biodiverseco).** Vivaĵdiverseco ja estas speciala formo de diverseco; la du vortoj ne estas sinonimoj.
- 122–132 eko.** La familio de dek unu vortoj komenciĝantaj per la prefikso *eko*/ estas problema. Ni jam komentis ĝin en subsekcio 2.4. La Sekcio pri faka lingvo emas malrekomendi tiujn el ili kiuj estas kunmetaĵoj de scienca prefikso kun ordinarlingva vorto. Tamen en specialaj okazoj oni povus krei vorton per tiu ĉi vortelemanto, kaj tiam aparte difinenda.
- 122 ekobredado.** La Sekcio pri faka lingvo rekomendas eviton de tiu termino kaj proponas *mediprotekta bredado*.

- 123 ekokultur(ad)o.** La Sekcio pri faka lingvo rekomendas eviton de tiu termino kaj proponas *mediprizorga kultivado* – plej ofte temas pri kultivado de manĝaĵoj, ne pri kulturado de kampoj.
- 125 ekologiisto.** Laŭ NPIV la sufikso *-ist/* havas du signifojn. Ĉi tie oni evidente celas la duan, ĉar la unua estas donita per la termino 127 *ekologo*. Sed ne estas facile memori tion. Eble pli klare diri *ekologiismo* por 125 *ekologiisto*.
- 130 ekonutraĵo.** La Sekcio pri faka lingvo rekomendas eviton de tiu termino kaj proponas *ekologia nutraĵo*.
- 132 ekoturismo.** Eble pro ĝia iom vasta uzado tiu termino estas akceptebla vorto por la pli longaj esprimoj *ekologie respondeca turismo* aŭ *medizorga turismo*.
- 133 ekskurso.** La angla vorto *outing* estas aldoninda, ĉar pli ofta ol *trip*, *hike*.
- 134 ekskurso, enmonta.** La Sekcio pri faka lingvo preferas *ekskurso, monta* aŭ *ekskurso, enmontara*. (Enmonta ekskurso tamen eblas se la monto havas taŭgan groton.)
- 174 fizionomio** (= *karakteriza ekstera aspekto de animaloj, homoj, vegetaloj*). Ĉi tie la homoj aperas dufoje, ĉar inkluzivitaj inter la animaloj. Eble pli simple *karakteriza ekstera aspekto de vivuloj*.
- 214 frontrado (de biciklo)** estas laŭ la Sekcio pri faka lingvo evitinda termino, anstataŭigenda per *antaŭa rado (de biciklo)*.
- 222 geno** (= *portanto de genetika informo*). Prefere oni difinu la terminon kiel ‘kromosoma elemento kiu portas informon pri heredblaj karakterizaĵoj’ aŭ eble ‘parto de la hereda komplekso kiu decidas pri certa heredbla eco ĉe la portanto per determino de la konsisto de polipeptido’.
- 227 GMO** (= **genetike modifita organismo**). Prefere *gene modifita organismo*, ĉar estas modifitaj la genoj, dum la genetiko estas la scienco pri ili.
- 270 kamphirundo.** La angla traduko devas esti *swallow* kun du *l*.
- 291 klono.** La kapvorto estas en singularo, la klarigo en pluralo. Oni akordigu ilin; ekzemple: ‘organismo estigita el unu zigoto kaj tial gene identa kun alia organismo’ aŭ ‘grupo de idente egalaj ĉeloj derivitaj el unu patrino ĉelo’.
- 301 kserofitoj.** Ĉio estas en pluralo ĉi tie. Normale kapvortoj estu en singularo kun tradukoj en singularo.
- 302 kultivi, 303 kulturi.** Tiu paro estas iom problema. Al la Sekcio pri faka lingvo ŝajnas ke oni en la nuna lingvouzo ne distingas inter la kultivado de rozoj kaj la kulturado de la tero. Plia esploro estas bezonata. Eble oni uzu *kultivi* por ambaŭ aktivecoj kaj lasu al *kulturi* la signifojn 3 kaj 4 en NPIV.
- 325 litsako** (= **dormosako**). La Sekcio pri faka lingvo opinias ke la termino *dormosako* sufiĉas. Bicikla turisto povas kunporti dormosakon, sed apenaŭ liton.
- 326 lumilo** (= **reflektoro**) (**de biciklo**). Laŭ NPIV *lumilo* estas aparato kiu produktas lumon; nek reflektoro nek reflektilo faras tion. Do misgvida vortelekto. Reflektoro estas laŭ NPIV reflektilo malantaŭ lampo kiu intensigas ties lumon; pro tio oni uzu *reflektilo* ĉi tie.

- 330 malaerobia (= aernetolera).** Laŭ la kompreno de la Sekcio pri faka lingvo la angla termino *anaerobic* uzata pri organismo, ekzemple bakterio, signifas ke la organismo kapablas vivi sen oksigeno. Kelkaj tiaj bakterioj eble ne povas vivi se oksigeno ĉeestas; ili estas aernetoleraĵoj. Temas do pri du malsamaj ecoj: la kapablo vivi sen oksigeno estas unu; la malkapablo vivi en oksigeno alia. Eble oni povas distingi ilin per *neaerobia* kaj *malaerobia*. Oni devas repensi kaj akordigi la tradukojn.
- 331 malbonigado de teritorio.** Ĉu ne pli taŭga termino estus *malbonigado de la medio*?
- 337 marĉ(ej)o.** La Sekcio pri faka lingvo opinias ke *marĉo* kaj *marĉejo* estas du malsamsignifaj vortoj; vidu en NPIV.
- 354 mirtelbero, 355 mirtelo.** Laŭ la Universala vortaro en la Fundamento de Esperanto mirtelo estas bero, same kiel oksikoko, sorpo kaj vakcinio. NPIV, male, difinas unuavice la vorton kiel arbusteton kaj duavice kiel beron. La Sekcio pri faka lingvo rekomendas ke la vortareto sekvu la Fundamenton. Cetere la ĝenerala lingvouzo sekvas ĝin. Ni do proponas **354 mirtelo, 355 mirtelujo** por la bero kaj la arbusteto.
- 368 nestado.** Nestado estas laŭ NPIV la ago de birdoj kiuj konstruas neston, do ne estas la tempo dum kiu tiu ago okazas. La Sekcio pri faka lingvo rekomendas reverkadon.
- 379 oksikoko.** Ĉe *mirtelo* kaj *vakcinio* la manuskripto distingas inter la arbusteto kaj ties frukto. Kial ne ĉi tie? Laŭ la Universala vortaro la vorto signifas beron. Analogie kun *mirtelo* kaj *vakcinio* la Sekcio pri faka lingvo rekomendas **oksikoko, oksikokujo** por la bero kaj la arbusteto.
- 383 organismo, genetike modifita.** La Sekcio pri faka lingvo proponas *organismo, gene modifita*; vidu terminon 227 *GMO*.
- 387 ozontavolo.** Ĉi tie oni uzas la vorton *alto* en la signifo de 30 *altitudo*. La Sekcio pri faka lingvo ne kontraŭas; ni volas nur atentigi pri tiu ĉi malkongruo inter la artikoloj 387 kaj 30.
- 399 pedologio (= grundologio).** La sinonimo estas ekzemplo de evitinda kunmetaĵo de ordinara vortelemento kaj grekdevena scienca vortelemento; vidu sektion 2.
- planti, planto.** Tiuj vortoj mankas. La duopo estas problema, ĉar en la Fundamento la radiko *plant* havas verban signifon, alivorte la elira vorto estas la verbo *planti*. Tamen en la nuna lingvouzo oni ofte uzas *planto* en la signifo de la Fundamenta *kreskaĵo*, kaj NPIV havas la substantivon *planto* kiel kapvorton. La Sekcio pri faka lingvo atentigas pri la paro por instigi al pensado.
- 417 plantprotektado, biologia, 418 plantprotektado, ĥemia, 419 plantprotektado, integra.** Kiel jam rimarkigite la radiko *plant* en la Fundamento de Esperanto havas verbajn tradukojn, alivorte la primitiva vorto estas la verbo *planti*. Tamen *plantprotektado* estas akceptebla, sed prefere la vortareto enhavu iun indikon pri la problemo.

- 425 pneŭmatiko.** La pli mallonga *pneŭo* estas pli uzata en la ĉiutaga lingvaĵo kaj tial menciinda. Cetere, ĉu oni ne bezonas du vortojn: unu por la interna aertubo kaj alia por la ĝin ĉirkaŭanta guma protektaĵo? Vera bicikla turisto certe bezonas ambaŭ.
- 428 poluaĵo:** *substancoj* estu *substancoj*.
- 431 postlumo de biciklo.** La Sekcio pri faka lingvo proponas *malantaŭa lampo de biciklo*.
- 432 postrado de biciklo.** La Sekcio pri faka lingvo proponas *malantaŭa rado de biciklo*.
- 458 rezervejo** (= *relative malgranda teritorio protektata kontraŭ homagado*). La Sekcio pri faka lingvo proponas ke la vortoj *relative malgranda* estu forstrekitaj, ĉar la termino mem ne implicas ion pri la granda.
- 487 skalo de mapo.** Oni devas inversigi la ordon en la difino: devas esti la kvociento inter la distancoj sur la mapo kaj la veraj distancoj.
- 492 sledo.** Oni metu en la unuan lokon la samsignifan vorton *glitveturilo* el la Fundamento.
- 493 sojlo de malutilo.** La difino eble prefere estu *nombro de individuoj en populacio de insektoj, ekde kiu tiu ĉi populacio komencas malutili*. Sed ĉu temas nur pri insektoj?
- 501 stacidomo, 502 stacio.** Tiuj du artikoloj devas esti reverkitaj. La germana *Haltestelle* respondas al la esperanta *haltejo*, dum la esperanta *stacidomo* estas *Bahnhofgebäude* en la germana. Prefere do tri terminoj, *haltejo*, *stacidomo* kaj *stacio* kun seneraraj tradukoj.
- sterko.** Tiu vorto mankas. Prefere oni enmetu ĝin, ĉar ĝi estas la baza vorto por ne malpli ol ok terminoj, 504–511, kiuj nun aperas sen la elira vorto kaj sen ties difino.
- 526 ŝoseo.** Tiu vorto havas du signifojn en NPIV: “**1** larĝa vojo, konstruita por veturiloj, iom altigita, ambaŭflanke borderita per fosaĵo k[aj] kovrita per pavimo aŭ surpremita gruzo. **2** La centra parto de urba strato, borderita de trotuaroj.” Ĉi tie oni miksas ilin. Laŭ la germana traduko *Autobahn* ŝajnas ke oni ĉi tie celas *aŭtovojo*, *aŭtoŝoseo*. En Britio oni diras *motorway* por la germana *Autobahn*; en Usono ekzistas pluraj tipoj de rapidaj vojoj: *expressway*, *freeway*, *highway*. La Sekcio pri faka lingvo rekomendas reverkadon inkluzive kontrolon de la tradukoj.
- 540 tetrao (= bonazio), 541 tetraono, 542 tetro.** Laŭ NPIV *tetrao*, kvankam listigita en la Fundamento, estas evitinda. Ŝajnas ke iu specialisto pri birdoj devas pensi denove pri tiuj kvar birdonomoj.
- 549 torfmarĉejo.** Pro la malsamaj vortoj *marĉo* kaj *marĉejo* oni ĉi tie diru *torfmarĉo*, ĉar en marĉejo la torfo estiĝas nur en la marĉoj.
- 561 urbanizado.** Tiu vorto enestas en NPIV, sed ŝajnas esti malĝuste transprenita de nacilingvaj vortoj, *Urbanisierung*, *urbanization*, *urbanisation*. La celata signifo estas ‘urbecigo’ aŭ eble ‘urbecigo’. La Sekcio pri faka lingvo rekomendas la terminon *urbecigo*.

- 565 vakcinibero, 566 vakcinio.** Laŭ la Universala vortaro en la Fundamento de Esperanto vakcinio estas bero, same kiel mirtelo, oksikoko kaj sorpo. NPIV, male, difinas la vorton kiel arbusteton. La Sekcio pri faka lingvo rekomendas ke la vortareto sekvu la Fundamenton. Cetere la ĝenerala lingvouzo sekvas ĝin. Ni do proponas **565 vakcinio, 566 vakciniujo** por la bero kaj la arbusteto.
- 568 vegeta periodo.** Laŭ la konvencioj de la vortareto (vidu sekcion 4) oni devus skribi *periodo, vegeta* ĉi tie.
- 576 vipero.** Oni prefere aldonu rimarkigon ke la Fundamento de Esperanto havas la formon *vipuro*.
- 585 vojo, kota / pavimita / seka / ŝton(oz)a.** Laŭ la Sekcio pri faka lingvo *ŝtonoza vojo* estas vojo kun tro da ŝtonoj (vidu la senvinjetan sufikson (3) *-oz/* en NPIV). Verŝajne vi celas la pli neŭtralan *ŝtona vojo*, aŭ *ŝtonizita vojo*, ‘vojo provizita per ŝtonoj’ (NPIV enhavas la teknikan sufikson *-iz/*).
- 588 vulpotruo.** La angla traduko devas esti skribita per apostrofo, ne per akcento-signo: *fox’s den*, ne “fox’s den”.

10. Konkludo

La manuskripto estas ĝenerale dirite tre bone organizita kaj tre zorge verkita. La Sekcio pri faka lingvo kritikis en tiu ĉi raporto kelkajn trajtojn, i.a. la troan uzon de la prefiksoj *bio/* kaj *eko/*, kaj plurajn unuopajn terminojn kaj ties difinojn. Ni forte esperas ke la aŭtoroj povos reverki la kritikitajn artikolojn.

Se post kontrolo montriĝos ke la fina produkto estos bone respondinta al granda plimulto de la rekomendoj en la raporto, ĝi meritos la stampon *Aprobata de la Sekcio pri faka lingvo de la Akademio de Esperanto*.

Referencoj

- Akademio de Esperanto (2008). *La Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro. Oficialaj Aldonoj Unua ĝis Naŭa (1909–2007) korektitaj kaj reeldonitaj*. Projekto – versio de la 19a de Junio 2008.
- Grosjean-Maupin, E.; Esselin, A.; Grenkamp-Kornfeld, S.; Waringhien, G. (1930). *Plena vortaro de Esperanto*, PV. Parizo: Centra Presejo Esperantista.
- Kaloscay, K.; Waringhien, G. (1985). *Plena analiza gramatiko de Esperanto*, PAG. Kvina korektita eldono. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto*, NPIV (2002). Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Pluhař, Zdeněk; Westermayer, Manfred; Fettes, Christopher; Skilling, Raymond (MS). *Ekoturisma vortareto: Esperanta – ĉeĥa – germana – angla – franca*. 58 pp. [La pritraktita libromanuskripto. Ĝi enhavas 592 terminojn en Esperanto kun tradukoj en la kvar aliajn lingvojn.]
- Suonuuti, Heidi (1998). *Terminologia gvidilo*. Tradukis el la angla Sabine Fiedler. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- Webster’s New World Dictionary of American English* (1994). Neufeldt, Victoria (Editor in Chief), Guralnik, David B. (Editor in Chief Emeritus). Nov-Jorko k.a.: Prentice Hall.

- Wennergren, Bertilo. *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*, PMEG. Rete havebla ĉe <http://bertilow.com/pmeg/index.html>. Ligo kontrolita 2011-04-02.
- Wüster, Eugen (1991). *Einführung in die allgemeine Terminologielehre und Terminologische Lexicographie*. Tria eldono. Bonn: Romantischer Verlag.
- Zamenhof, L. L. (1939). *Fundamenta krestomatia de la lingvo Esperanto*. Deksesa eldono. Parizo: Esperantista Centra Librejo.
- Zamenhof, L. L. (1991). *Fundamento de Esperanto*. Deko eldono. Pizo: Edistudio. [Unua eldono 1905.]

Protokolo

La nuna teksto estas la kvara propono pri raporto ellaborita ene de la Sekcio pri faka lingvo.

La Sekcio pri faka lingvo de la Akademio de Esperanto havas dek unu membrojn. El ili sep partoprenis en la preparado de la nuna raporto. La membroj voĉdonis jene:

Marc Bavant <mjb0@wanadoo.fr>. Voĉdonis “pore kaj petas la direktoron aneksi al la protokolo la suban apartan opinion” (2011-04-07).

Renato Corsetti (ekde 2011-02-16) <renato.corsetti@uniroma1.it, renato.corsetti@virgilio.it>. Voĉdonis “por” (2011-04-04).

Marcos Cramer <marcos.cramer@gmail.com>. Voĉdonis “por” (2011-04-05).

Ottó Haszpra <othasz@gmail.com>. Voĉdonilo ne ricevita.

Christer Kiselman (direktoro) <kiselman@math.uu.se, christer@kiselman.eu>. Voĉdonis aprobe (2011-04-04).

François Lo Jacomo <francoislojacomoeu>. Voĉdonilo ne ricevita.

Paŭlo Moĵaev <paulo.mojxajev@gmail.com>. Voĉdonis “por” (2011-04-09).

Sergio Pokrovskij <sergio.pokrovskij@gmail.com>. Voĉdonis sindetene (2011-04-09).

Alexander Shlafer <lolozido-AdE@yahoo.com>. Voĉdonis “aprobe” (2011-04-09).

Amri Wandel <amri@huji.ac.il>. Voĉdonis “por” (2011-04-05).

Yamasaki Seikō <syama@qf6.so-net.ne.jp>. Voĉdonis aprobe (2011-04-07).

Kiam temas pri decidoj de la tuta Akademio de Esperanto rilataj al lingvouzo, ĝi decidas per absoluta plimulto de la voĉdonantoj, se almenaŭ du trionoj de la membroj voĉdonis, alie per absoluta plimulto de ĉiuj membroj. Kvankam tiu regulo ne estas deviga por sekcio, ni interkonsentis sekvi ĝin por tiu ĉi sekcia decido.

Voĉdonis 9 el 11 sekcianoj, sekve pli ol du trionoj. Laŭ la interkonsentita proceduro tiam sufiĉos por decido simpla plimulto de la voĉoj. Ĉar voĉdonis aprobe 8 el 9, la kvara raportopropo estas nun aprobita de la sekcio. (Ni notu ke ok konsistigas eĉ plimulton en la tuta sekcio.)

La demando estis, laŭ konsilo de la ĝenerala sekretario Renato Corsetti, traktita nur ene de la sekcio, kaj nun iros al la petintoj Petr Chrdle kaj Zdeněk Pluhař.

Aparta opinio de Marc Bavant

Mi konsentas kun la raporto krom en pluraj punktoj, kiuj estis prezentitaj de mi en la diskuto, sed ignoritaj de la direktoro. Ĉi-sube aperas la tri miaopinie plej ĝenaj.

Netaŭga por oficiala dokumento de la Akademio de Esperanto aspektas al mi la interpunkcia stilo, kiun uzis la direktoro. La diskuto montris, ke tia stilo havas neniun avantaĝon kompare kun la Zamenhofa.

Plurloke aperas en la raporto mencioj pri “sciencaj afiksoj” aŭ “sciencaj sufiksoj”. Estas miaopinie malprudente en tia dokumento nomi la koncernajn vorterojn afiksoj, ĉar tio kreas riskon intermiksi la ebenon de la Esperanta vortfarado (radikoj, oficialaj afiksoj, potencie libera kombineblo) kun la etimologia ebena (severe limigita kombineblo), kiun riskon cetere la raporto celas kontraŭbatali per la prava konsilo ne miksi en unu vorto elementon de ambaŭ ebenaĵoj. Dum iu “scienca afikso” ne estas oficiale agnoskita de la Akademio, ĝi restas simpla parto de la radiko, kaj nenio pravigas malsaman analizon por, ekz-e, “furioz-a” kaj “ŝton-oz-a”, “mikrofon-o” kaj “mikro-tom-o”, aŭ “telefon-o” kaj “tele-skop-o”.

La raporto konsilas ne uzi la mallongigon *lat.* por la t.n. “sciencaj nomoj” en la kampoj zoologia kaj botanika. Mi male opinias, ke tiaj nomoj apartenas al bone difinita lingvo, nome al iu konvencia latina lingvo, ampleksigita per pruntaĵoj kaj kunmetaĵoj, kiun lingvon oni kutimas nomi “latinscienca” en Esperanto. Sekve, bone taŭgas la menciita mallongigo.